

& Feina sorto:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

a;do /dodo dore doTi La;So dodo dore mimi mimi; miifafa soso somi mi;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Fe/ino vivis en la lag' ;
Kun viv' soleca kaj kvieta ;
Kaj al la bord' je unu tag' ;
Alvenis juna vir' poeta.

(×: **Dancu soleca feino ; Venu al junula sino ; Li forlasos baldaŭ vin ; Dancu soleca feino.**)

'2 Kaj bela estis la junul' ;
Kaj bukla lia brunhararo ;
Ardante brilis sorĉa brul' ;
En lia nigra okulparo.

'3 Ekvidis ŝin la juna vir' ;
Ekflamis lia kor' amema ;
Li kantis kanton pri l' sopir' ; Kaj vokis
ŝin per voĉo trema.

'4 Solecon frostan de l' fein' ; Neniam
tuŝis voĉo tia ; Ensorĉis por eterne ŝin ;
La okulparo flamradia.

'5 Kaj plenumiĝis ŝia sort' ; Tra l' koro
boris amo-sago ; Tirate de ravanta fort'
; Sen vol' ŝi venis el la lago.

'6 Iliajn lipojn ama brul' ;
Kunfandis. Vane vokis ondo. ; Ŝi, man'
en mano kun junul' ; Ekiris al mortema
mondo.

'7 Kaj estis por eterne for' ;
Fedigno virgulina, sorĉa ;
Ŝi donis ĝin plezure por ;
La ravo de la amo dolĉa.

'8 Kaj ne ekfloris plu narcis' ; Se lipojn
ŝi por rid' malfermis ; Ne milda flor',
sed fajra kis' ; Sur ŝiaj ruĝaj lipoj
ĝermis.

'9 Kaj se ekkaptis ŝin dolor' ; L' okuloj
plu ne perlojn rulis. ; Sed vera, homa,
sala plor' ; Varmega larm' en ili brulis.
.....

'10 Kaj ĉiam pli kaj pli da larm' ;
Elgutis al ŝi el okulo ; Ĉar, ve, ekvelkis
ŝia ĉarm' ; Kaj ŝin forlasis la junulo.
.....

'11 Feinoj, estas la destin' ;
Por vi kruela kaj malbrila. ; La sort'
elekti trudas vin ;
Elekto estas malfacila:

'12 Fevivon frostan vivi sur ; La koro
kun glacia krusto ; Aŭ en pasema
amplezur' ; Ekvelki sur la vira brusto.
.....)